# LIGILO

N-RO 14 - APR/MAJ/JUN 1992

**BRAZILA ESPERANTO-LIGO**
Caixa Postal 3625, CEP 70084, Brasília (DF) Tel: 226-1298



## KARA LEGANTO,

Tiu ĉi numero 14-a de LIGILO, krom renovigi al ciu esperantisto la inviton partopreni en la 28-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO, okazonta de 12 ĝis 17/jul/1992, en Anápolis (GO) celas, kiel la lasta en la aktuala ofic-periodo, prezenti al la membraro kaj la ĝenerala publiko resuman Estrar-Raporton jul'89/jul'92 kun Bilanco 1991.

Kiel dirite, temas pri resuma Raporto kaj Bilanco, kiuj eble por la unua fojo estas prezentitaj almenaŭ kelkajn tagojn antaŭ la kongreso, kun la celo permesi pli profundan analizon fare de la Federacia Konsilantaro kaj interesitoj por la diskutado kaj voĉdonado dum la Ĝenerala Asembleo en Anápolis.

Tiusence, 2 gravajn demandojn estas oportune levi, nome:

-- Ĉu vi estas paginta BEL-jarkotizon 1992, kaj tielmaniere rajtigita partopreni en la Ĝenerala Asembleo kiu elektos la novan Estraron?

-- Ĉu vi jam aliĝis al la 28-a BKE, tiel helpante al la Organiza Komitato ne enfali la konsternon aligi la plej multon surloke, kiel pasint-jare en Vitória?

Atentu ke, aliĝo pli frua permesas al la organizantoj pli bone plani ĉiujn detalojn cele al via kontentigo kaj sukceso de la kongreso. Kio tute ne signifas ke oni malakceptos dumkongresan aliĝon.

**ALIĜINTE AŬ NE...**
**ESTU BONVENA, NE HEZITU!**

# ESTRARA RAPORTO DE BRAZILA ESPERANTO-LIGO 1989-1992 KAJ BILANCO 1991

1. ENKONDUKO

Tiu ĉi Estrara Raporto resume pritraktas la agadon de BRAZILA ESPERANTO-LIGO dum la periodo jul.1989/jul.1992, kun registro de la plej gravaj okazaĵoj sur la diversaj kampoj, kiel Administrado, Financoj, Eksteraj Rilatoj kaj ĝeneralaj aspektoj, kies ĉefa celo estas liveri al la Federacia Konsilantaro kaj al la membraro bazajn informojn por analizo kaj voĉdonado okaze de la Ĝenerala Asembleo en Anápolis.

2. ĜENERALAĴOJ

2.01 - Estraro

La Estraro elektita en 1989 estis:

Prezidanto : José Lins Albuquerque<br>
Vic-Prezidanto: Josias Ferreira Barboza<br>
1a Sekretario : Enivaldo Alves Silva<br>
2a Sekretario : Ester Pinto de Souza<br>
3a Sekretario : Carlos Almeida de Deus<br>
1a Kasistino : Francisca de F.A. de Deus<br>
2a Kasisto : Waldir Antônio Silvestre<br>
Kontrol-Komitato: Delamar A. de Assis<br>
José Carlos G. Vieira<br>
Lia Milhomem Moreno<br>
Komitatano "A" : Evaldo Pauli

El tiuj, 3 demisiiĝis, nome: Ester, Carlos kaj Waldir, anstataŭigitaj dum la 27a BKE, en Vitória, respektive, per Jorge das Neves, Ivaldo Alves de Souza kaj José Carlos Dorini.

2.02 - Federacia Konsilantaro

Kreita per la Statuto aprobita en Campo Grande, kun la celo difini la gvidiliniojn de la nacia movado, por efektivigi ĝian federacian karakteron, la Konsilantaro, malgraŭ kelkaj klopodoj de la Estraro de BEL -- kiel provo aranĝi apartan seminarion por pritrakti la temon (Vidu LIGILO-n N-ro 6, Jan. 1990) -- ĝis nun, verdire, ne efektiviĝis.

El la 26 stataj asocioj nur 5 petis aliĝon, nome: São Paulo, Santa Catarina, Rio Grande do Norte, Rio Grande do Sul kaj Ceará antaŭ nelonge.

2.03 - Verkado de Fundamentaj Dokumentoj

Per la titolo Fundamentaj Dokumentoj ĉi tie ni celas la "KONGRESA REGULARO"-n kaj la "INTERNA REGLAMENTO"-n de BEL.

La koncernaj projektoj estas, ekde januaro 1991, pretigitaj de BEL-estraranoj kaj devus esti laŭstatute aprobitaj de la Federacia Konsilantaro (Vd. LIGILO-n N-ro 11, Apr/Maj/Jun'1991).

3. ADMINISTRADO

3.01 - Stabo

Krom la elektitaj membroj de la Estraro, daŭre kunlaboris Francisco Mattos kaj Adolpho de Miranda (libroservo), Carlos Maria (abonservo), José Carlos Dorini (librotenado/kontorado). Aliaj estis portempaj kunlaborantoj kio ne signifas malpli gravaj.

En tiu periodo, kiel antaŭe, pro faktoroj diversaj BEL efektive ne havis dungitojn. Maksimume estis pagitaj de BEL la tagmanĝo kaj vojaĝkostoj (bus-bileto/benzino) por kelkaj kunlaborantoj.

3.02 - Sidejo/Havaĵoj

Ek de sia enposteniĝo, la Estraro de BEL faris diversajn provojn solvi la tiklan demandon rilate al la malgranda labor-spaco ($36m^2$, proksimume) en la sidejo de BEL. Tiusence estis proponoj al la Registaro de la Federacia Distrikto pere de Sekretario de Kulturo kaj Terracap, pruntedoni pli vastan spacon al LIGO, kontraŭ kunlaboro en la kampo de diskonigo de informoj rilate al la kulturo kaj aliaj interesoj de DF. Samcele estis propono al organizaĵo en la federala sfero. Bedaŭrinde, ĝis nun ne estas pozitivaj rezultoj.

Grandan helpon ni ricevis de Prof. Aymorè Vaz Pinto, kiu tre ĝentile disponigis al LIGO spacon en lia farmbieno en la ĉirkaŭaĵoj de Brazilio (LIGILO N-ro 10), kie restas plejparto de la Libroservo-stoko kaj variaj dokumentoj.

Tamen, kiel anoncite en LIGILO N-ro 8 kaj 9, LIGO ricevis donace de samideano Josè Romão Filho 2 parcelojn po $200m^2$, proksimume 100km for de Brazilio per asfaltita vojo. Donace ankaŭ estas ricevitaj de Delegacia da Receita Federal elektronika respond-maŝino (secretaria eletrônica) kaj videobend-aparato.

Estas aĉetita mikrokomputilo kongrua al IBM PC-XT kun la koncerna presmaŝino, kio multe helpas en la financaj kaj administraj taskoj, kiel librotenado kaj adresaro. Tamen ankoraŭ ne entute pagita.

3.03 - Membraro

Kvankam ne tiel rapide kiel estus dezirinde, relativa progreso de la individua membraro de LIGO okazis en la lastaj 3 jaroj, kiel registris LIGILO 13.

3.04 - Eldona Agado

Kun la financa helpo de samideano Komandoro Josè Romão Filho (LIGILO 8 kaj 9) kaj la ordinaraj kasosaldoj ĵus okazas la 9-a eldono de LIGILO, t.e. de N-ro 6 ĝis 14. Pri la redaktado de LIGILO, respondecis ekde n-ro 7 la Sekretario de BEL, Enivaldo Alves Silva.

En tiu kampo Ligo ankaŭ fariĝis eldonisto de la muzik-kasedo "AERLUMO" produktita de la brazilia kantisto kaj komponisto Flàvio Fonseca.

Brazila Esperantisto, la historie oficiala organo de LIGO -- ĉefe pro manko de redaktora volontulo, ĉar homoj pretaj finance subteni la eldonadon certe troveblas -- ne estas eldonita dum tiu periodo.

3.05 - Kongresoj kaj Eventoj

La serio de la Brazilaj Kongresoj de Esperanto reprenita en 1986, post la kunfandiĝo, daŭras per la okazigo de la 26-a BKE en Salvador (Ba), 1990; 27-a BKE en Vitória (ES), 1991; kaj la 28-a BKE en Anápolis (GO), 1992. São Paulo venontjare devas gastigi la eventon. Ĉeesto de BEL-estrarano en regionaj kaj alispecaj eventoj estis kontraŭvole maloftaj pro iliaj laborkondiĉoj kaj disponeblecoj.

En ekstermovadaj eventoj raportindas la sukcesan partoprenon de Brazila Esperanto-Ligo en la XI Dujara Libro-Foiro (LIGILO N-ro 9) kaj en la Monda Konferenco Pri Ekologio kaj Evoluo (Rio 92) en kunlaboro kun UEA kaj AERĴ, kies detala raporto estas ero de la kongres-programo.

Per kunaranĝo de Zamenhofa festo, en decembro 1989, en la Pola Ambasadejo en Brazilio, estis lanĉita la bazo de estonta kontrakto pri kultur-kunlaboro, kies flegado bedaŭrinde nedaŭre sekvis pro absoluta manko de kompetenta kaj libertempa volontulo surloke.

3.06 - <u>Libroservo kaj Abonservo</u>

Jen 2 el la plej sukcesaj BEL-agadoj lastatempe, kiujn ni komplete ŝuldas al la sindonemo, laborkapablo kaj kompetenteco de la triopo Francisco Mattos, Adolpho de Miranda kaj Carlos Maria. Se la nombro de periodaĵoj aboneblaj pere de BEL kreskis de 20 al 32 (+60%), la titoloj en la Libroservo saltis de malpli ol 400 al 1300 proksimume (+225%), en la periodo jul'89/jul'92 kaj tiel fariĝis la plej grava enspez-fonto de BEL, pli ol la duoblo de la jarkotizoj (Vd.Financojn). La Libroservo-stokon en 31.12.91 oni taksis je Cr$ 80.350.885,38 aŭ 69,6% de la aktivo de BEL. Apartaj laŭdoj pri tiu servo venis rekte de UEA (Vd. LIGILOn 13) kun rekono de ĝia evoluo.

4. FINANCOJ

BALANÇO GERAL DA LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO EM 31.12.91

| | | | |
|---|---|---|---|
| | **A T I V O** | | |
| I | - Circulante | | |
| | CAIXA......................... | 44.779,55 | |
| | BANCOS CONTA MOVIMENTO.... | 2.184.666,41 | |
| | BANCOS CONTA INVESTIMENTO. | 100.796,50 | 2.330.242,46 |
| II | - Permanente | | |
| | IMÓVEIS....................... | 21.000.000,00 | |
| | MÓVEIS E UTENSÍLIOS........ | 5.348.000,00 | 26.348.000,00 |
| III | - Realizável | | |
| | CONTAS CORRENTES........... | 6.382.909,62 | |
| | LIVRARIA...................... | 80.350.895,38 | 86.733.805,00 |
| | | | ------------- |
| | | | 115.412.047,46 |
| ====== | | | ============= |
| | **P A S S I V O** | | |
| I | - Patrimonio Líquido | | |
| | FUNDO SOCIAL | | |
| | - Exercícios anteriores. | 4.952.792,72 | |
| | - Reavaliação do Ativo.. | 96.791.414,85 | |
| | - Exercício de 1991..... | 3.144.123,72 | 104.888.331,29 |
| II | - Exigível | | |
| | CONTAS CORRENTES........... | 4.833.040,12 | |
| | CONTAS A CLASSIFICAR...... | 262.726,93 | |
| | REPRESENTAÇÃO DE JORNAIS E REVISTAS.............. | 5.427.949,12 | 10.523.716,17 |
| | | ------------- | ------------- |
| | | | 115.412.047,46 |
| ===== | | | ============= |

Brasília (DF), 31 de dezembro de 1991

Josias Ferreira Barbosa
Vice-Presidente

Francisca F. Almeida Deus
Tesoureira

CONSELHO FISCAL

Delamar A. de Assis — José Carlos G. Vieira — Lia Milhomem Moreno

## NOTAS EXPLICATIVAS RELATIVAS AO BALANÇO GERAL DE 31.12.91

01 - As rubricas contábeis IMÓVEIS, MÓVEIS E UTENSÍLIOS e LIVRARIA tiveram seus saldos em 31.12.91 corrigidos a preço de mercado, cujo montante, no valor de Cr$ 96.791.414,85, foi agregado ao patrimônio da Liga;

02 - O saldo da rubrica CONTAS CORRENTES, no ATIVO, representa valores que diversos devem à Liga;

03 - O saldo da rubrica CONTAS CORRENTES, no PASSIVO, representa valores que a Liga deve a diversos;

04 - O saldo da rubrica CONTAS A CLASSIFICAR, representa valores que diversos depositaram na conta da Liga, junto ao Banco do Brasil no chamado sistema ON-LINE, sem informação do nome e da finalidade do depósito;

05 - O saldo da rubrica REPRESENTAÇÃO DE JORNAIS E REVISTAS representa valores destinados à assinaturas de jornais e revistas, recebidos de diversos, durante o mês de dezembro/91, não recambiados às editoras dentro do próprio mês.

## DEMONSTRAÇÃO DA CONTA " RESULTADO DO EXERCÍCIO " EM 31.12.91

**DÉBITOS**

| | |
|---|---|
| Contas Correntes | 229.678,51 |
| Água | 11.490,00 |
| Condomínio | 238.496,00 |
| Cópia | 67.314,00 |
| Correio | 1.533.222,00 |
| Representações em Congressos | 110.000,00 |
| Imposto e Taxas | 81.059,26 |
| Limpeza e Conservação | 30.630,00 |
| Luz | 27.820,43 |
| Material de Escritório | 134.804,00 |
| Telefone | 140.628,00 |
| Transporte | 175.641,55 |
| Serviços Gráficos | 597.260,00 |
| Descontos/Abatimentos Concedidos | 436.079,40 |
| Lanches e Refeições | 1.268.628,20 |
| Subtotal | 5.082.751,35 |
| Superavit transferido para FUNDO SOCIAL | 99.935.538,57 |
| Total | 105.018.289,92 |

**CRÉDITOS**

| | |
|---|---|
| Contas Correntes | 278.061,03 |
| Anuidade | 2.150.084,39 |
| Donativo | 635.438,84 |
| Juros e Correção Monetária | 149.623,24 |
| Livraria-Saída | 4.768.176,34 |
| Rendas de Investimentos | 141.491,23 |
| Curso Correspondência-Receitas | 104.000,00 |
| Livraria-Correção Monetária | 73.232.654,98 |
| Imóveis-Correção Monetária | 19.592.991,31 |
| Móveis e Utensílios-Correção Monet. | 3.965.768,56 |
| Total | 105.018.289,92 |

Brasília (DF), 31 de dezembro de 1991

Josias Ferreira Barboza
Vice-Presidente

Francisca [illegible] Almeida Deus
Tesoureira

Conselho Fiscal

Delamar A. de Assis — José Carlos G. Vieira — Lia Milhomem Moreno

## PARECER DO CONSELHO FISCAL

Nós, membros efetivos do Conselho Fiscal da Liga Brasileira de Esperanto, eleitos para o período de julho/89 a julho/92, tendo examinado o Balanço Geral da Liga Brasileira de Esperanto, referente ao exercício de 1991, a Demonstração da conta "Resultado do Exercício", balancetes mensais, bem como, por amostragem, os comprovantes de receitas e de despesas, demonstrativos, relações e demais documentos que compõem a contabilidade, e tendo julgado os mesmos corretos, somos de parecer que as contas da Liga Brasileira de Esperanto, referentes ao período de 01.01.91 a 31.12.91, devam ser aprovadas pela Assembléia Geral Ordinária, a ser realizada durante o 28º Congresso Brasileiro de Esperanto, no mês de julho de 1992, na cidade de Anápolis (GO).

Brasília (DF), 08 de junho de 1992

Delamar A. de Assis — José Carlos G. Vieira — Lia Milhomem Moreno

# BRAZILA ESPERANTO-LIGO

SCS - Ed. Jockey Club, Sl. 103, Brasília-DF, Brazilo, 70084

## BOLETIM DE ADESAO
## 1992

Nome ____________________

Endereco ____________________

CEP __________ Cidade ____________________ Estado ________

Telefone _____ ( ______ ) __________ Data de Nascimento ______ / ______ / ______

Profissao ou Especialidade ____________________

Data ____ / ____ / ____ Assinatura ____________________

1. LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO (Precos validos ate 30.09.92)

Socio Contribuinte.................................Cr$ 54.000,00
Familiar de Socio..................................Cr$ 27.000,00
Estudante (ate 25 anos)............................Cr$ 27.000,00
Socio Colaborador...........a partir de............Cr$ 108.000,00
Socio Vitalicio (30 vezes a de Socio Contribuinte).Cr$ 1.620.000,00
Donativo...........................................Cr$ ________

2. ASSOCIACAO MUNDIAL DE ESPERANTO (UEA)

Categorias:

MG - Recebe apenas o MANUAL sobre o movimento esperantista...........8,00gld(*).Cr$ ________

MJ - Recebe o ANUARIO (a revista KONTAKTO se for menor de 30 anos)...........20,00gld...Cr$ ________

MA - Recebe o ANUARIO e a revista ESPERANTO (e a revista KONTAKTO se menor de 30 anos)..........48,00gld...Cr$ ________

DM - Recebe o ANUARIO e a revista ESPERANTO (+ a revista KONTAKTO se menor de 30 anos) por toda a vida .............1.200,00gld...Cr$ ________

SO ASSINATURA DE REVISTA

Revista ESPERANTO...........................28,00gld...Cr$ ________
Revista KONTAKTO............................14,00gld...Cr$ ________

SUBTOTAL...................................Cr$ ________

Despesas de remessa para o exterior (20% do Subtotal)
(Associado da LIGA quite 1992 esta ISENTO).................CR$ ________

TOTAL......................................CR$ ________

(*) O FLORIM (gld) equivale aprox. a 65% do DOLAR comercial para venda.

**BRAZILA ESPERANTO-LIGO**

Caixa Postal 3625, CEP 70084, Brasília (DF) Tel: 226-1298

ANÁPOLIS-GO 28ª BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

IMPRESSO

# LIGILO

Oficiala organo de
BRAZILA ESPERANTO-LIGO (BEL).

Aperas trimonate.
Redaktoro: Enivaldo Alves Silva

ESTRARO DE BEL
Prezidanto : Jose Lins Albuquerque
Vic-Prezidanto: Josias F. Barbosa
1ªSekretario : Enivaldo Alves Silva
2ªSekretario : Jorge das Neves
3ªSekretario : Ivaldo Alves de Souza
1ªKasisto : Francisca F.A de Deus
2ªKasisto : Jose Carlos Dorini

KUNLABORANTOJ:
Libroservo: Francisco Mattos
Adolpho de Miranda
Abonservo : Carlos Maria
KONTROLKOMITATO: Delamar A. de Assis
Jose Carlos G. Vieira
Lia Milhomem Moreno
KOMITATANO "A": Evaldo Pauli